N° 3 — Julio 1946 BULLETIN INTÉRIEUR Prezo : 6 fr. frankoj

Socia ordo kondukas nin nepre al nova amasbuĉado, al nova nepra milito.

# SENŜTATANO

Anarkio ne estas malordo: ĝi montras individualan sintenon, harmonion, konscion.

Monata Informilo de la
PROVIZORA KOMITATO DE LA JUNUL-ANARKISTA INTERNACIO

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO : E. VIVANCOS, 1, rue Fontaine-au-Roi, PARIS (11e) - Francio

KASISTO : Albert GRILLAT, 24, rue Grange-aux-Belles, Paris-10e (Francio)
Poŝtĉekkonto . . . . . . . . . . . . . . . . . . C. C. P. 2.082-31 Paris

JARABONO (10 NUMEROJ) :
Franclando . . . . . . . . . . . . . . . . . 60 fr. frankoj
Aliaj landoj : 70 fr. frankoj aŭ 7 respondkuponoj

## BAKUNIN

DUM la jaro 1864, Bakunin loĝas en Italio. Li estas 50-jaraĝa. Tiu leonkolhara koloso, fuĝita el siberiaj stepoj depost tri jaroj, estas pro lia pasinteca konduto fama ĉie, kiel reputacia revoluciulo.

Naskinta en Priamonkhino (Ruslando) en 1814, li estis filo de homarema aristokrato, kiu konspiris en la «decembristaj» sekretaj societoj. Li forlasis je sia 18-a jaro la artilerian lernejon de Sankta-Petersburgo; dum du jaroj li deĵoris kiel oficiro en regimento de litovia distrikto, el Minsk, en tiu ĉi Pollando, kies ribeliĝo ĵus estis sufokita fie kaj «sovaĝe» per la rusa aŭtokratio. Rezignato, je 1834, li laboris dum ses jaroj en la Moskva Universitato. Tie li studis Condillac-on kaj la francajn materialistojn de la 18-a jarcento, poste la germanan filozofion de Fichte kaj fine Hegel-on, tiu panteista filosofo, kiu tiom influis je siaj samtempuloj. Sed la hegelana doktrino havis multoblajn konsiderojn; la moskvaj intelektuloj interpretis ĝin kiel konservativa senco finatingante l' apologion de la forto kaj ŝtatpravo. Kiam li venis Berlinon — kie li konatiĝis kun Ivano Turgenef — por daŭrigi siajn studojn, nur tiam la juna Bakunin eltrovis la maldekstran hegelanismon, tiun de Feuerbach kaj Bruno Bauer kiu estis samsenca, tiu de Maŭrico Hess, Karl Marx kaj iom pli malfrue Proudhon. Tiu ĉi avangarda filozofio finatingadis al la ateismo kaj al demokrataj ideoj; ĝi home novigis Bakunin-on. Estas tiel konstatinde, scivoleme, ke tio kio determinis la evoluon el famkonataj germanaj, slavaj revoluciuloj de la XIX-a jarcento, ne estis la observado de la realo, sed pliĝuste la metafiziko kaj la pure intelektaj spekulacioj.



Alveninta Dresdenon en la jaro 1842, Mikaelo Bakunin publikigis pseŭdonime en « Annales, les Allemandes, de Ruge (1) » resonegan artikolon pri la reakcio en Germanio, el kiu jen tiu memorinda linio : « La detrua deziro estas same konstrua volo ». Amikiĝinte kun la demokrata poeto Herwegh, li akompanas lin al Zürich, kie li vizitas la radikalulojn, komunistojn grupigitajn samtempe al Froebel kaj Weitling. Post la arestigo de tiu lasta, li forlasas la kantonon kaj sin loĝigas en Berno, ĉe la profesoro William Vogt, poste li atingas Brukselon pro rifuzo de la obeordono de la rusa registaro petante lin reveni sian landon senprokraste. El tie, li eniras en Francio, kie li kunlaboras je « Annales Franco-Allemandes », publiciitaj, ideologie de « Karl Marx kaj Ruge », li unuiĝas kun Lamennais, Proudhon — de kiu li ricevis grandan influon — kaj George Sand. Tiam la rusa registaro lin repunis pro persista propagando al la de li perditaj civitanaj rajtoj, al propraĵkonfisko kaj al eventuala ekziliĝo en Siberio.

En 1847, konsekvence de rimarkebla parolado en pola bankedo, li estis elpelita el Francio, je nomo de la rusa ambasadoro, kiu pretendis lin malhonori disvastigante la bruon, ke li estas rusa malfavora agento. Unu jaro pli malfrue, jen la Revolucio kaj li revenas Parizon por sin miksi en la enfebrita medio de la tiamaj kluboj. Poste li iras partopreni en la slava Kongreso de Prago, kie li postulas la detruon de la Rusa, Prusa, Aŭstra maldemokrataj registaroj. Li luktas ĉe barikadoj en Prago; senĉese li elpeliĝas el Prusio kaj Saksio ; heroe li batalas kun la ribelintoj en Dresdeno (majo 1849) kaj fine li estas rifuĝinta kun la muzikomponisto Wagner en Chemnitz, kie li estis arestita kaj mortkondamnita la 16-an de januaro 1850; favorita de punŝanĝo, li estis liverita al Aŭstrio, denove mortkondamnita (15-an de majo 1851) pro partopreno al praga liberiĝo kaj fine eltirita en Sta-Petersburgon.

Tiam li konis, kiel Blanqui en Francio, la malhelajn horojn de malliberiĝo : sen espero nek favoro. Post tri jaroj travivitaj en fortikaĵo Petro-kaj-Paŭlo, li estas translokita en kastelon de Schlüsselburg, kie li sentas febron, sendormecon, skorbuton, kiu eldentigas lin plene. Tio daŭras tri jarojn ankoraŭ !

Je la komenco de lia unua enkarcerigo, kiam li sentas silentigpunon ĝis la morto, li estis vizitita de la Interna Ministro de Nikolao la I-a, kiu proponas al li, je la nomo de la Caro, skribi sian konfeson. Li akceptas ĉu malesperita aŭ pro ruzo. ĉu ke li celu konverti la tiranon el sia idealo, aŭ ke li esperis tiamaniere forlasi la inferajn turmentojn. El tie, *la surpriza dokumento*, kie eltroviĝas la malsimpleco de sia rusa animo, unu ribelema spirito kontraŭ la maljusteco kaj ĉiama amo por ĉiuj malpotenculoj.

J. HORTELANO

(1) Verko priskribita daŭre la ĉiujaraj eventoj.

*(Fino en la proksima numero)*

## La situacio en Bulgario

*(Daŭrigo kaj fino)*

**Sub la ombro kaj la defendo de la soveta okupacia armeo, la laborista partio (Marks-Lenin-Stalin) komencas sisteme uzurpi la tutan ŝtatpotencon, ekposedi ĉiujn organizaciojn : profesiajn, kooperativajn, klerigajn, k. a. per teroro tremigante la popolon, pasive kunhelpata de la eksprofaŝistaj elementoj de la burĝa partoprenreganta partio "ĉenero" (Zveno), kiu tenas ĉefajn ministeriojn en la registaro, kiam « Patrolanda Fronto » en Septembro 1944 deklaris liberecon por ĉiuj kontraŭfaŝistaj movadoj, partioj kaj apartaj agantoj nune tio estas nur programo !**

**Liberecon havas nur homoj de la laborista partio supre menciita. Ĉiuj aliaj kontraŭfaŝistaj movadoj, kiuj ne agas kiel ĝi volas, estas persekutataj ; ili devas vivi kaj labori kaŝe ; leĝo speciala pri tio estas la "Leĝo por defendo de la popola aŭtoritato", tute egala al la malnovaj faŝistaj leĝoj. La libereco de parolado, presado kaj organizado ne ekzistas.**

**Konataj kaj veraj batalantoj kontraŭ faŝismo estas persekutataj, malliberigitaj aŭ estas irigataj en mallibertendarojn al deviga, peza laboro, kiel tio okazis dum la faŝistaj reĝimoj sen juĝprocedo k. verdikto.**

**La registaro kruele persekutas ĉiun socian agon de la anarkia komunista federacio, de la vilaĝa demokrata movado, agrara movado de Stambolijski, de socialdemokratoj, k. t. p. Eĉ la regpartoprenantaj partioj estas devigataj labori sub la kuratoreco de la laborista partio de Georgi Dimitrov, ĝia gvidanto. Nuntempe kiel antaŭe, la armilaro estas plej forta kaj « vera » argumento de la ŝtata potenco kontraŭ popolo kaj ĝiaj batalantoj.**

**La popolo, tamen baldaŭe kompreniis sian vanan iluzion kaj fermiĝis en si malkontenta. La mastruma situacio malboniĝas de tago al tago. La milita okupacio de la Soveta Armeo pezegas sur la ŝultroj de la popola mastrumo, detruita dum la militjaroj. Unuflanka prosoveta politiko de la registaro, la malfruigo de la paco kaj la malebleco kreigi komercajn ligojn kun okcidentaj landoj, venigis la mastrumon kaj la popolon en tre malbonan staton, sen sceptaj perspektivoj por baldaŭa plibonigo. Meze la laborpopolo kreskas denove la batalo kontraŭ la nova bolŝevika tiraneco por pli da pano kaj libereco ; por pli da socia justeco kaj homeco ; por libereco de la konvinkoj, de la parolado, presado kaj organizado !**

**Jen kia estas la situacio, karaj Gelegantoj, en nia "libera, plej demokrata kaj potenca lando" Bulgario.**

LIBERAMANTO

## ETIKO KAJ ESTETIKO

*Kiam ni rimarkas noblan agon laŭ niaj propraj moralaj principoj; kiam ni intime konas personon kies konduto adaptiĝas skrupule al sia altvalora pensmaniero kaj ni admiras lin; kiam ni ĝuas plene kaj sincere la amikecon delikatan kaj spiritan; kiam ni sentas, kiel la amo plene kontentigas nin; kiam ni mem serĉas ordigi nian vivmanieron plenumante niajn sentojn, tiam ni havas sencon pri la Etiko.*

*La Etiko gvidas nian moralan konduton kaj tial, pensemulo, filozofulo aŭ idealulo ne povas malestimi ĝin; nepre ili estas devigataj havi moralajn principojn, ĉar se ili ne havus tiujn principojn, ili neigus sin mem.*

*Kiam, promenante tra la kamparo, ni vidas belan pejzaĝon kaj niaj okuloj fiksiĝas momenton por konsideri ĝin; kiam artefarita aĵo altiras nian atenton mirigante nin same kiel ravigas nin bela korpo de nuda virino; kiam ni ŝatas ordigi niajn proprajn aĵojn laŭ nia persona gusto; kiam ni amas purecon kaj ĝi estas por ni necesaĵo, tiam ni havas sencon pri la Estetiko.*

*La Estetiko gvidas nian bonguston kaj artisto estas devigata koni ĝin, ĉar se la pensemulo inspiriĝas el la moralo, la artisto inspiriĝas el la bongusto.*

*Etiko kaj Estetiko kompletiĝas. La unua rilatas la spiriton kaj la dua la materion, kiuj estas la du substancoj el kiuj konsistas la homo.*

*La homo aspiras al boneco kaj al beleco. Tial li serĉas kontentigi samtempe sian spiriton kaj siajn sentojn; tial, li avide kaj konstante superiĝas...*

***Tial homo estas supera al besto.***

Boris QUERALT

## Okazis balotado

En ĉi tiu lando, unu jaro post la « Liberigo » kaj por la dua fojo, la popolo voĉdonis kaj elektis siajn reprezentantojn !

Dume granda parto el la sama popolo malsatas kaj alia parto vegetas en mizera vivo, la diversaj politikaj partioj senhezite kaj malavare elspezis milionojn da frankoj por sia balota propagando.

Tiu mono cetere fontas rekte el la laboristaj poŝoj ! Ĝi estas volonte oferita sub formo de kotizoj, akcio de gazetoj, libroj aŭ donacoj !... Kiu kredus, ke instruistoj plendas, ĉar mankas papero por la lernejoj ?

Dum pluraj tagoj, la muroj kaj stratoj estis superŝutataj kaj malpurigataj per afiŝegoj aŭ flugfolioj. Tiutempe famaj oratoroj jen blekis, insultis, paroladis, flatis aŭ minacis, laŭ la cirkonstancoj, ĉiuokaze multe promesis !

Fakte, tiu amasa presdiboĉo kaj la demagogiaj paroladoj celis nur rekruti plej multnombrajn voĉojn, necesajn por la venko de iu partio super la aliaj. La popolo saĝe tralegis kaj pacience aŭskultis por fine deponi en la urnon sian « valoran balotilon » konvinkita, ke tiel agante, ĝi manifestas sian potencan volon !

Ho ! naivaj kaj kredemaj popoloj, malklera ŝafaro nutrita de iluzioj ! Kiam do vi komprenos, ke tiuj al kiuj vi propravole ĵus donis la potencon neniam uzos ĝin por la plibonigo de via sorto !

Tamen la multnombraj spertoj de la pasinteco devus esti sufiĉe instruaj ! Kiom da registaroj sekvadis laŭ la diversaj « respublikoj »... dekstren aŭ maldekstren orientitaj, ĉu ili ion alportis al la laboristaro, krom komplikan leĝaron, kiu sub

*(Daŭrigo sur la 2-a paĝo)*

## La milito kaj la Liberecanoj

Antaŭ la lasta milito ekzistis en Francio forta kontraŭmilita movado. Ankaŭ en Germanio estis multaj junuloj, kiuj akceptis nek pafilon, nek uniformon.

La franca militista tribunalo punis tiajn « krimulojn », enkarcerigante ilin du jarojn.

La hitlera Germanio estis severega kaj kiuj ne akceptis eniri en la armeon estis mortpafitaj aŭ kondamnitaj en malliberejo por ĉiam.

Dum tiu ĉi lasta milito, mi ne vidis multajn junulojn ne akceptante militi. Mi nur renkontis tri; unu el ili respondis, ke li preferas morti ol iri al milito.

En Anglio, la homoj, kiuj rifuzis estis malliberigataj; kiam ili estis juĝataj, ili respondis, ke ilia religio malpermesas la krimojn.

En Usono, la kontraŭmilitemuloj ankoraŭ estas en malliberejo, ĉar la demokrata registaro ne permesas, ke vivu libere tiuj « danĝeraj banditoj ». Tio estos ekzemplo por la venonta fojo.

La franca registaro amnestiis du kontraŭulojn: la nunan komunistan ministron Thorez kaj Marty.

La homaro scias, kiel teruraj estis la koncentrejoj de Dachau kaj Buchenwald, sed neniu kredas, ke la francaj malliberejoj estas kiel la germanaj, ke en ĉiuj landoj la malliberestroj estas monstroj, mortigantoj senpretekste, ke la malliberuloj ricevas aĉan manĝajon kaj netrinkeblan akvon.

La liberecanoj ne devas esti ŝafblekantaj paceamuloj, sed konsciaj luktantoj je la Revolucio.

**Paŭl CAMUS**

## PENSEROJ

- **La homoj naskiĝis unu por la aliaj do korektu ilin aŭ ilin toleru.**
- **Forpeli dogmon kaj akcepti alian jen kio okazas ĝenerale...**
- **Esperanto ne estas por kotizi nek propagandi: praktiku ĝin!**
- **Ĉiu morala doktrino, kiu estas ekstera aŭ fremda al via konscia voĉo kondukas nin nepre al nova milito.**
- **Utila filozofio, kiun oni ne praktikas neniom ĝi valoras.**
- **La socia leĝo nur celas socion. Praktiku la vian kaj tiam vi konkiros alian vivon.** *H.*

# NIA MOVADO TRA LA MONDO

**Nederlando**

La 23-an de junio okazis en Amsterdamo konferenco de liberecanaj esperantistoj, kie oni decidis la kreadon de Komitato, kies celo estas la propagando de anarkismo per Esperanto. Tiu komitato propagandas samtempe Esperanton en la du nederlandaj anarkistaj grupoj.

**Francio**

La nova franca sindikato C. N. T., franca sekcio de A.I.T., rapide kreskas en la laboristaj medioj kaj atingas sufiĉe bonajn rezultatojn en la industriaj urboj. Baldaŭ la nova organizajo ludos gravan rolon en la socia vivo de Francio.

La anarkistaj francaj junularoj aperigos tre baldaŭ informilon: « Jeunesse Anarchiste » (Anarkista Junularo).

**Italio**

« Giuventu Anarchica », organo de niaj italaj kamaradoj, estas pretigota. Ĉie novaj propagandiloj venas kunlabori en nian novan taskon.

**Nordafriko**

La anarkistaj junuloj en Nordafriko aliĝas al la Junul-Anarkista Internacio.

**Britio**

Septembron lastan okazis en Glasgovo la unua Kongreso de la Anarkista Federacio de Britio, organizo starigata de la tri grupoj de Glasgovo, Burnbank (Skotlando) kaj Londono, kune kun kelkaj kamaradoj alilokaj. Pluraj gravaj rezolucioj decidiĝis kaj klare montriĝis, ke la movado, kvankam ankoraŭ ne tre granda, reakiris tiom da vigleco kaj unueco, kiom ĝi havis antaŭ la komenco de 1945, kiam la perfido de kelkaj « kamaradoj » perdigis al ĝi la eldonejon kaj kaŭzis portempan konfuzon kaj miskomprenojn.

Oni devus klarigi, ke la nuntempa propagandado en Britio kreskis el la laboro de la C. N. T.-F. A. I.-a Buro en Londono kaj la ĵurnalo « Spain and the World » (Hispanio kaj la Mondo) dum la hispana milito. Stariĝis en Glasgovo la Anarkist-Komunista Federacio (poste la Anarkista Federacio) kaj en Londono la Anarkista Federacio kiu, kvankam neniam tiel granda aŭ loke influpova, kiel la grupoj en Glaskovo kaj Burnbank (la Burnbanka Anarkista Grupo estas la plej malnova en la lando) vigle daŭris propagandi sub la eldoneja titolo « Freedom Press »* (Liberecana Eldonejo), aperigante dum la tuta militempo la ĉiudusemajnan ĵurnalon « War Commentary » (Milita Komentaro). La Federacio faris, ke kelkaj membroj de la Redakcio estu la « laŭleĝaj » posedantoj de la eldonejo, paperkoncesio kaj presejo kaj post malkonsentoj rilate propagandcelojn, ĉi tiuj, falsiginte kaj sekretiginte la federaciajn kontojn, uzis sian pozicion por kapti la esprimrimedajn movadojn. Pro iliaj intencaj malklarigoj, portempe iom subtenis ilin la aliaj du grupoj, sed baldaŭ ambaŭ vertrovis, kvankam forŝira grupeto glasgova, la « Sindikato de Anarkistoj », ankoraŭ subtenas « Freedom Press »-on kaj la ĵurnalon « War Commentary », nun « Freedom » (Libereco) kaj malhelpas la laboron de la Federacio en Glasgovo. Freŝdate stariĝis Londona Anarkista Grupo kaj, en decembro lasta, Unio de Anarkistaj Grupoj, kiel rivala organizo kontraŭ la A.F.B. kaj subtenanta « Freedom Press », kiu estas nun privata kompanio kaj la esprimilo de neniu organizo.

Malgraŭ ĉi tiu malhelpo kaj la kalumnioj disvastigitaj de siaj « rivaluloj », la Federacio energie daŭrigas sian laboron. Ĝi aperigas monatan ĵurnalon, « Direct Action » (Agado Direkta), kiu kreskis de dufolietaĵo unue aperigata de la Londona Grupo en Majo 1946, tra multaj malhelpegoj, al ĵurnalformata nacia organo kiu, kvankam mankante paperkoncesion, grade fariĝas firmstaranta ĵurnalo, daŭre disvastigante ideojn kaj principojn anarko-sindikalistajn kaj fidele reflektante la lukton de la brita laboristo.

La movado ankaŭ progresas bone alisfere: jam stariĝis pluraj grupoj en aliaj lokoj kaj oni kontaktiĝis kun la I.W.W. (Industriaj Laboristoj de la Mondo) en Usono, rilate la starigon de Brita Sekcio. Kun la nuna malprosperado de la Brita Imperio kaj la tiala malprosperado de la brita laboristaro, estas certe, ke tia revolucia laborist-reunio ĉie kreskos kaj subteniĝos. La movado antaŭenrigardas kun espero kaj fido.

* Malnova titolo de eldonejo starigata de Petro Kropotkin kaj aliaj, en Londono, en 1886.

## KOMUNIKAĴOJ

*Komitato de Liberecanaj Esperantistoj en Nederlando. — Liberecanaj Esperantistoj en Nederlando kaj en Belgio, subtenu la propagandon por Esperanto inter la anarkistaj kamaradoj kaj por anarkismo inter la Esperantistoj.*

*Petu informojn ĉe nia sekretariejo: Koningstraat 481-v, Hago. Abonu la gazeton « Senŝtatano ». Jarabono: f. 2.—, ĉe K-do A. Smit, Plaatijzerweg 58, Amsterdam (N).*

## Okazis balotado *(Daŭrigo kaj fino)*

aspektoj pli aŭ malpli mildaj, katenas ĝin kaj servigas ĝin al konstantaj sklavaj vivkondiĉoj?

Ĉu tio — dum ĝia ekspluatantaro lukse ĝuas de la produkto de ĝia ŝvitlaboro — ne estas hontinda, en la nuna civilizacio, konstati en kia kultura grado malaltnivela restas la amasoj? precipe la junularo! Pugnoj premiĝas, kiam oni vidas ĝin perdigi ĝian belan tempon kaj sonas en mallumaj kinoĉambroj aŭ trinkejoj dum filmaktoroj, fuŝproduktantoj kaj aliaj profitistoj vivas kiel reĝetoj!

Se fine troviĝas tamen *elitoj*, kiuj je gravaj riskoj kaj post penigaj, senĉesaj agadoj sukcesas iom klerigi parton el la laboristaro, se tiu lasta iafoje ekvidas la ĝustan vojon kaj minacas ribeliĝi, tiam la registaroj, laŭ ordo de la tutmonda kapitalistaro, ekfunkciigas sian plej potencan aparaton: la ***militon***.

Post jaroj da suferoj, la laboristoj laciĝos, malfortiĝos, milionoj da viroj malaperos dum la buĉado, ruinoj amasiĝos, malsato regnos, ĉio kvietiĝos kaj la celo estos atingita! Oni ludos tiam la komedion de la paco, de la liberiĝo, oni rekonstruigos kaj, ĉar varoj mankas, oni kompreneble akiros novajn riĉaĵojn kulturante nigran merkaton.

Samtempe oni zorge flegos la malamon inter la nacioj por la antaŭviditaj estontaj bezonoj! Tiom longe kiom la laborista klaso fidas al la politikaj ĉarlatanoj el iu ajn partio; tiom longe kiom ĝi blinde deponos sian sorton en la manojn de tiuj perfiduloj kaj rajtigos ilin superregi kaj eldikti sian volon; tiom longe, kiom la laboristaro tutmonda ne komprenos, ke nur ĝia unuiĝo, ĝia propra rekta agado ĝis natura disfalo de la *ŝtato*, ĝia propra organizado kaj dispartigo de la laboro kaj produktoj povas esti efikaj por la plibonigo de sia sorto; tiom longe do, la laboristaro estos sklavigita, prirabita, trompita, stultigita, enkarcerigita kaj mortigita, eĉ igita intermurdiĝi je la plej granda profito de la eternaj krimuloj, kiuj formas la Sennaciecan Asocion Kapitalistan, helpita de fidelaj gardhundoj nomitaj: registaranoj, policanoj, arme- kaj eklezio-bonzoj, sen forgesi la parazitajn « burokratulojn ».

Kamaradoj! Malfermu la okulojn, klerigu viajn *klas*-fratojn; forskuu la jugon, unuiĝu kaj preparu dum estas ankoraŭ tempo la morgaŭan renverson de la putranta nuna socio-ordo. La estonto estos nia! Nova mondo ekstaros, paco eterna regos sur tiu planedo, feliĉa rajtos esti ĉiu homo!

Tiam fine efektiviĝos la prediko de Zamenhof: « *La nepoj vin benos!* »

**Petro JAGER**

IMPRIMERIE J. POLGAR
33, RUE LACÉPÈDE, PARIS-5e

## LA GRANDAJ PENSULOJ

### HAN RYNER

# LA KONSPIRANTOJ

*(Daŭrigo kaj fino)*

— Firme respondis Neoklo — mi aŭdas paroli frenezulon.

Simono minacis lin pugne tiamaniere, ke li estus povinta mortigi virbovon unufrape. Sed tiu, kiun li minacis mezuris proprokule la grandegan korpon kapmovante kaj dirante al li:

— Vi estas nur bruto havanta tre grandan malsaton.

Andocido haltigis la minacgeston de Simono.

— Juĝisto mi estas nur ĉi tie, li diris firmsone, kaj mi malpermesas, ke vi batu...

— Mi obeas al vi kiel Zeuso-n mem, riproĉetis la terura kaj absurda estulo, sed mi preferus vin plezurigi batante ol ne...

— Mi liberigos vin, aldonis la mastro. Cetere, mi donos al ĉiu el vi belan bienegon kun tridek sklavoj por valorigi ĝin.

Simono kaj Elafo — forgesante la malfortikan korpon kaj maldelikatan spiriton de tiu homo, ekgenufleksis antaŭ li kaj pere de siaj etenditaj brakoj ili proklamis:

— Ho, granda, ho belega, ho bonfaranta! Verdire, Andocido estas la dia nomo vizinta la teron!

Malgranda Sokrato silentis. Li rigardis kompate la humiliĝon de tiuj sklavoj kaj de la mastro la vantan arogantecon.

— Kaj vi, demandis la mastro, ĉu vi ne trovas la konvenajn vortojn por tiu ĉi solena momento? Ŝajnas al mi, ke korpinklino estas filozofa virto.

— Kion mi dirus al vi, malsaĝulo? ke vi donas tion, kio ne apartenas al vi!

— Mi ne komprenas...

— Nur homo apartenas al si mem. Mi malŝatas tiun, kiu sub masko homa, enhavas troan, sovaĝan kaj serveman naturon sin kredante mastro aŭ sklavo.

Elafo ekdubis, ke Andocido sin pentus pri lia decido: li alproksimiĝis al Neoklo konsilante lin tuj kaj duonvoĉe:

— Akceptu tion kaj liberigu la tridek sklavojn, kiujn oni havigos al vi. Tiel vi estos farinta bonon al iu.

— Ĉiu homo, krom laŭŝajnoj, estas libera se li konas la homan dignon. Nur estas vera sklavo tiu, kiu sin proklamas la mastro. Kredeble ŝajnis al mi, ke ĉi tie nur estis unu sklavo, sed mi vidas tri...

— Mi pruvos al vi — diris Andocido —, ke nur restas unu. Tion kion mi promesis, mi tenos ĝin rilate al tiuj du, kies dankema koro igas ilin esti liberindaj. Koncerne al vi, maldankema, mi krucumigos vin.

Neoklo estis do krucumita, insultita de la dek mil sklavoj el la vasta bienego, ĉar oni informis ilin:

— Li povus unuvorte liberigi multajn el liaj samsortanoj. Kruele li rifuzas tion. Kaj kontraŭ vi, li sin montris la plej malindulga el ĉiuj tiranoj.

Dum nerakontebla insultfreneziĝo la mastro trudis silenton deklarante:

— Mi estas bona kiel dio. Kondiĉe, ke li rekonu mian potencon kaj mian bonkorecon. De l' arbo malhonoriga mi malligigos lin. Sed, ke li atentu: elĉerpiĝis l' akvo, korp-ardo-freŝeco kaj jen, la turnita akvohorloĝo ekĉirkaŭiros tra ardan horon de justeco kaj venĝo.

La malgranda Sokrato rigardis supren kaj li eĉ ne digniĝis scii kiajn personojn ĉirkaŭadis lin. Anstataŭ respondi, li ekkantis kaj lia kanto melodie diradis:

— Ĉiam mi restis staranta kiel inda homo, surda al sklavemaj kriegoj aŭ al minacantaj bojoj de tiuj, kies animo marŝas kvarkrure. Pro tio mi akiras la mortrekompencon pli supren ol mi vivadis: nun plenplene ĵetita al ĉielo!

La mastro ŝultremoviĝis kaj forestiĝis.

Tiam la sklavoj, kolektante ŝtonojn, ĵetis ilin sur la krucumitulon, ridege, kriege.

Subtila Elafo atentigis:

— Eĉ estas necese zorgemon pri tia amuzludado.

Li, do, malproksimigis la sklavojn. La reven-dezirantaj venu siavice: ĉiu al konvena distanco ĵetu ŝtonojn. Tiel okasis festotago, amuza por ĉiuj kaj eĉ oni premiis la plej lertajn.

*Tradukis:*

**J. HORTELANO**

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL